
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

5

2025-07-31

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## FESTPAROLADO DE DUNCAN CHARTERS, PREZIDANTO DE UEA, Burno 2025

(fragmento)

Dobrý den, Brno! Saluton kaj bonvenon al Burno!

Karaj Kongresanoj, karaj distingitaj reprezentantoj de Ĉeĥio, Armenio, Ĉinio, Hungario, Pollando kaj Ukrainio,

Universala Esperanto-Asocio ĝojas esti unuafoje en historia Brno por nia cent-deka Universala Kongreso. Niaj Kongresanoj jam komencis ĝui konatiĝon kun la allogaj ĉirkaŭaĵoj kaj monumentoj kiuj atestas la valoron de la ĉeĥa kulturo kaj tute aparte de Moravio, unu el la historiaj ĉeĥaj landoj, kaj ties ĉefa metropolo, Brno, tiel nomita ekde la jaro 1641. Antaŭ pluraj jaroj mi havis la okazon ĉeesti konferencon por ĉeĥaj instruistoj de la angla lingvo en la antaŭa ĉefurbo de Moravio, Olomouc, kie oni provizis interpretan servon el Brno por tiuj instruistoj de la angla, kiuj ne kapablis ĝin kompreni sufiĉe por sekvi la kongresajn paroladojn en tiu lingvo. Tiu konferenco, nomita "English is not enough": "Ne sufiĉas la angla lingvo" reliefigis la miton, ke kono de la angla lingvo estas sen aliaj rimedoj universala ŝlosilo de komercaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj kaj popoloj.

Historie, ĉeĥoj bone komprenis la apartan valoron de Esperanto por faciligi internaciajn interŝanĝojn kaj diskonigon de kulturaj valoroj. Kiam mi estis studento, kiu komencis interesiĝi pri Esperanto, mi legis en historio de nia movado en la angla lingvo pri la "Verda Stacio", la radiostacio bazita en Brno, kiu elsendis regule en nia lingvo ekde 1927, kiam la stacio proponis kurson pri Esperanto, montrante la vojon por dekoj de aliaj stacioj tra la mondo. La konvinka fakto, kiu plej impresis min el tiu libro kaj gravuriĝis en mia memoro, estis la pli ol du-jardeka sindediĉo de centoj da individuoj al radiodissendoj en nia lingvo. Unue disaŭdiĝis historiaj kaj kulturaj prelegoj pri la nacio. La reagoj spronis unike ambician programadon, kiun nur nia lingvo kapablis subteni. Mi ne troigas. Miloj da aŭskultantoj esprimis sian dankemon per leteroj al la redakcio, kaj en 1933 jam elsendiĝis regulaj artaj programoj. Tion ebligis speciala kurso de RadioJournal por la profesiaj kantistoj kaj aktoroj de la grupo Teatro kaj Radio Aktoroj, TRAKT. Pro la relative rapida lerneblo de Esperanto, tiu grupo, kiu inkluzivis famiĝontajn junajn talentojn, produktis dramojn, operetojn, kaj en kunlaboro kun la radiorkestro kaj ĥoro de la Burna stacio en Brno kaj poste Prago, eĉ plenajn operojn kun ĝis 140 partoprenantoj, inkluzive de tiel konataj komponistoj kiel Antonín Dvorak kaj Bedřich Smetana. Tio helpis respondi miajn demandojn pri la valoro de Esperanto. Mi konvinkiĝis, ke nia lingvo havas plenan potencialon unike servi kiel instrumento de kultura edukiĝo kaj ĝuado trans landlimoj kaj lingvaj baroj.

Sojle de la centjara datreveno de la lanĉo de tiu donaco de la ĉeĥoj al la mondo, ni konstatas ke Esperanto neniel perdis siajn unikajn avantaĝojn kiel praktika kaj arta

komunikilo inter individuoj kaj popoloj. Same kiel por tiuj membroj de TRAKT, kiuj lernis nian lingvon por atingi internacian publikon, ĝuante por daŭra muzikarta kunlaboro ĝian apartan belecon, Esperanto estas la sola lingvo rapide lernebla de instruistoj, kiuj kapablos gvidi siajn lernantojn al aŭtenta kultura inter-kompreniĝo.

# Inaŭgura parolado de ĈEA-prezidanto

(sabate la 26-an de julio)

Estimataj samideanoj, karaj amikoj kaj honoraj gastoj,

Estas granda plezuro por mi stari ĉi tie hodiaŭ en la bela urbo Brno, por partopreni inaŭguron de la 110a Universala Kongreso. Ni kunvenas en ĉi tiu historia loko, kie kulturo, scienco, kaj tradicioj kunfandiĝas, por festi la spiriton de kunlaboro, interŝanĝo, kaj progreso.

Ĝuste en tiu ĉi urbo estis fondita la unua E-klubo sur la teritorio de iama Aŭstrio-Hungario jam en la jaro 1901. Se ni hieraŭ festis la naskiĝdaton de nia lingvo, do imagu ke en tiu jaro La Unua Libro estis en pubera aĝo 14 jaroj. Kaj en Brno oni jam parolis Esperante.

Kaj por Esperanto en nia lando venis tempoj kaj bonaj kaj malbonaj. Iam ĝi progresis, iam ĝi estis malpermesita. Nur en la jaro 1969 estis denove restarigita nia asocio. Kaj denove tio okazis en urbo Brno. Do oni povas diri, ke sen urbo Brno ne estus nia asocio kaj sen ĝi ankaŭ ne estus nia nunjara kongreso. Do vivu la urbo BRNO!!

Hodiaŭ, ni ne nur reprezentas niajn proprajn landojn kaj kulturojn, sed ni ankaŭ simbolas la unuecon de la homaro. En ĉi tiu epoko de rapidaj ŝanĝoj kaj kresko de malamikeco kaj netoleremo, ni devas kunlabori pli ol iam ajn. La temo de la kongreso, Esperanto kaj teknologioj kiel ponto de paco kaj konfido inter la popoloj, ne estas nur loka, sed havas tutmonda**n** signifo**n**.

Dum ĉi tiu kongreso, mi invitas vin ĉiujn ne nur partopreni en la diskutoj, sed ankaŭ konstrui rilatojn. Ĉiu el ni havas unikan perspektivon kaj sperton, kiu povas kontribui al la pli granda bildo. Ni estas ĉi tie por lerni unu de la alia, por inspiri unu la alian.

Ni ne forgesu, ke la decidoj, kiujn ni faras hodiaŭ, influos la estontecon de niaj komunumoj kaj la mondon. Ni havas la ŝancon formi la direkton, en kiu ni iras. Ĉi tiu kongreso estas ne nur platformo por diskuto, sed ankaŭ por agado. Ni ĉiuj havas la respondecon porti la mesaĝon de ĉi tiu kongreso al niaj hejmoj.

Mi volas danki al ĉiuj, kiuj helpis kun la organizado de tiu ĉi evento, al ĉiuj, kiuj kontribuis al la programo, kaj al vi ĉiuj, kiuj venis ĉi tien por partopreni. Ni havas mirindan semajnon antaŭ ni, plena je oportunoj por lerni, interagi, kaj inspiri unu la alian.

Do, mi el tuta mia koro deziras fruktodonan semajnon al vi!

# Parolado de ĈEA-prezidanto ĉe la Esperanto-arbo

Mi salutas kaj bonvenigas vin en urbo, kie E-movado havas longan tradicion. Estis ĉi tie fondita unua Esperanto-klubo en tiama aŭstria imperio. Inter militoj de ĉi tie elsendadis Esperanta radiostacio Verda Stelo kun neforgesebla aktoro Karel Höger. Kaj plue, en tiu ĉi urbo estis en la jaro 1969 fondita ĈEA. Ĝis nun la urbo ne havis propran ZEOn, objekton, kiu portas nomon ĉu de Zamenhof, ĉu de Esperanto. Per tiu ĉi arbo LIKVIDAMBARO STORAKA (ambroň západní) ni volas pagi tiun ĉi ŝuldon al la urbo kaj samtempe memorprigi la unuan universalan kongreson en BRNO.

Jiří Tomeček

# Aliĝu al Graz

Jam funkcias aliĝilo por la sekvajara 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz, Aŭstrio!
Kongresanoj, kiuj aliĝas kaj pagas dum la nuna UK en Brno, ricevas 10-eŭran rabaton por la kotizo. Eksciu pli en la speciala budo en la konstruaĵo Q kaj plenigu la aliĝilon ĉe uk.esperanto.net/2026!

# Origamio

"Lernu Esperanton per origamio" okazos ĵaŭde la 31-an de julio, de 12:45 ĝis 13:30? Jam estis planite tiel, sed la dato estas erara en la listo de programeroj de la kongres-libro.

# KAVA-PECH ne plu en Esperanto

Pro multaj demandoj mi klarigas, ke la Esperanto-fakon de mia eldonejo KAVA-PECH transprenis François Bolduc el kanada Montrealo. La stoko de la libroj eldonitaj estas parte en Montrealo, parte en Budapeŝto ĉe lia kunlaborantino Stela Besényei Metzger, kiu plenumas la mendojn el Eŭropo.
La retadreso de la nova eldonejo estas kavapech1@gmail.com. Ĝis ĝi havos propran retejon, eblas mendi librojn plu ĉe https://kava-pech.cz/esperanto kaj mi plusendos la mendon al ĝi.
Pli vi povos ekscii dum mia aŭtora duonhoro ĵaŭde de la 14a horo.
Petro Chrdle, KN 14, chrdle@kava-pech.cz

# Dek premiitoj de la kvara Interkultura Novel-Konkurso (INK) anoncitaj dum la 110-a UK en Brno, Ĉeĥio

Jen la dek premiitoj:

**Sperta kategorio**

1. Zakhar Serebrov – Rusio: Kie vojoj renkontiĝas
2. Jorge Rafael Nogueras – Portoriko - La ĉioscieco de OV-GPT
3. Ljudmila Shebella – Estonio: Lasta lavo
4. Yin Jiaxin – Ĉinio: Olda Fan kaj la roboto-edzino
5. Mahin Rad – Irano: Ruĝa saŭco sur blua ĉemizo

**Komencanta kategorio**

1. Javad Eskandari Mayvan – Irano: Kunulo
2. Elisabetta Antichi – Italio: Dankon, Komputilo
3. Mikhail Reztsov – Rusio: Malsatklingokuristo
4. Olena Klymovskykh – Ukrainio: Generatoro de falsa vivo
5. Stefan Grotz – Germanio: Nenio pli gravas

Pluraj el tiuj noveloj estos aŭskulteblaj en voĉlegita versio en la jutuba kanalo de Bobelarto, Spotify kaj aliaj podkasto-apoj.

Ĉiuj detaloj troviĝas ĉe:
bobelarto.ink/konkurso/

# Kleriga Lundo

Plene sukcesis la Kleriga Lundo dum UK 2025 en Brno. Okazis rekorda nombro de 18 prelegoj, en 3 blokoj de po 6 prelegoj.
Premiere unu el la prelegoj okazis hibride, dank'al teknika subteno de la organizantoj. La prelegon pri DR Kongo gvidis Mirejo Grosjean anstataŭ la planita aktivulo, kiu ne povis partopreni pro vizo-problemo.
Plurfoje la salonoj ne sufiĉe grandis por la amasa publiko. Bone reprezentitaj estis la virinaj prelegantoj: 9 el 18. Koran dankon al niaj talentaj prelegintoj kaj al la multaj partoprenintoj.

# Ĉu vi stenografas?

"Ni volas restarigi la fakan asocion: IAES = Internacia Asocio de Esperantistaj Steno-grafiistoj. Se vi stenografas laŭ via preferata sistemo, bv kontakti nin:
rubensan15@gmail.com"

Prof. Ruben Sanchez

# Ĉu vi perdis ion?

En informejo eble atendas vin via perdita aĵo! Vesto, ĉapo, kongresa sako… eĉ okulvitroj!

# Butiko de ĈEA

En la kongresejo de la unua tago funkcias Butiko de ĈEA (Ĉeĥa Esperanto-Asocio), en kiu ĉiu partoprenanto de la Kongreso povas aĉeti diversajn varojn, kiu rememorigos al ili belajn tagon en Brno.
Certe la plej interesa estas Kongresa biero el bona ĉeĥa bierfabriko Svijany vendata en ladskatoloj, kiujn oni povas facile forporti al hejmlando. Sed ankaŭ oni povas fortrinki la bieron kune kun amikoj surloke, ĉar eblas aĉeti ĝin bone malvarmigitan. Por la malŝatantoj de alkoholo oni povas proponi ankaŭ senalkoholan bieron, kiu estas sambongusta kiel la klasika.
Por ĝojigi geamikojn oni povas aĉeti kvar specojn da kongresaj bildkartoj. Kun la bildkartoj oni povas aĉeti ankaŭ poŝtmarkojn kaj skribinte la bildkartojn oni povas tuj enmeti ilin en la preparitan kongresan poŝtkeston.
Bela memoraĵo ankaŭ estas magnetoj, kiujn oni povas meti hejme ekzemple sur glaciŝrankon aŭ pinglobutonoj, kiuj povas ornami viajn vestaĵojn.
Esperantaj portempaj tatuaĵoj povas beligi vin dum la kongreso - vi tuj ĉe la butiko povas apliki ilin. Aŭ vi povas aĉeti tutan folion kaj ornami vin dum iuj pluaj Esperanto-aranĝoj.
Tio estis nur elekto de la interesaĵoj, kiujn vi povas trovi ĉe la Butiko. Do ne hezitu kaj venu! Ne hezitu kaj aĉetumu!

# Prezento pri Afrikaj Proverboj

Bonvolu veni malkovri la riĉecon de afrikaj proverboj en Esperanto dum mia prezento hodiaŭ, la 31-an de julio 2025, 14:15 ĝis 15:00, en la salono Ginz. Estas escepta kultura kunveno dediĉita al afrikaj proverboj tradukitaj kaj prezentitaj en Esperanto. La kunveno ne nur ebligos al vi malkovri praulan afrikan saĝon per ĝiaj proverboj, sed ankaŭ celebri lingvan diversecon per la uzo de Esperanto.

Venu al momento de riĉiga interŝanĝo, kie tradicioj kaj lingvoj renkontiĝas, se vi pasias pri afrika kulturo, Esperanto, aŭ simple scivolas lerni pli! Via ĉeesto estos varme bonvenigata kaj dankata.

Se estos tempo, mi konigos al vi ankaŭ pri simpla maniero nomi homojn, en Togolando, laŭ la tago de la semajno en kiuj ili naskiĝis.

Adjé, Adjévi, KN 708